



Conselho Brasileiro de Esperanto

SCS — Ed. Jockey Club, sala 103 (sede própria)

Telefone: (061) 226-1298

CEP 70.300 — Brasília

Distrito Federal

CGC 00406504/0001-06

JAN/FEV 1982

BOLETIM INFORMATIVO

Nº 67

LA VERO SUPER ĈIO

Carlos A.S. Cunha

Kelkfoje ni aŭdas komentariojn pri ekzistanta malpaco inter Brazila Esperanto-Ligo, kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto. Ĉar nenio estas pli falsa sur la Tero ol tiu onidiro, ni pretas kredi, ke tiu malica aŭ naŭva komentario ekfloris pro eventuala miskompreno iam okazinta inter personoj, kiuj volis defendi kun entuziasmo siajn vidpunktojn koncernantajn la plej taŭgan vojon venkigi E-movadon en nia Lando. Sed tio ne karakterizas malpacon! Malpaco, laŭ nia kompreno, estas rilato inter du aŭ pluraj personoj aŭ homgrupoj, karakterizita per malamikaj agoj, paroloj aŭ intencoj, kio feliĉe neniam okazis inter la supremenciitaj institucioj. Aliflanke, anstataŭ estigi malpaciĝon en esperantista medio, la entuziasmo per kiu estas defendataj privataj ideoj kaj pensoj evidentiĝas sindediĉon kaj respondecon de homoj, kiuj laboradas en la sama direkto, por nobla idealo, sed piediras malsamajn vojojn. Ne forgesu ni, tamen,

ke pluraj vojoj kondukas la homojn al Dio, samkiel ĉiu vigla diskutado utilas, ĝuste pro tio, ke ĝi venigas novajn ideojn kaj alternativojn por plibonigi la orientadon de homgrupoj en la komunuma vivo.

Resume, la "milito" nenium mortigis, nenium vuŝdis, nek bankrotigis iun ajn institucion! Tute male, ĝi alproksimigis inter si la membrojn kaj estraranojn de la tri E-organizaĵoj, kies nunaj prezidantoj, Kolonelo Fernando José Galvão Marinho (BEL), D-ro Braz Cosenza (KKE) kaj la aŭtoro (BKE), bone interrilatiĝas kiel sinceraj amikoj kaj, krom tio, ĉiu el ili estas individue ligita al la socia vivo de la aliaj du organizaĵoj, kelkfoje per rekta partopreno en ties direktorado.

Do, unu fojon por ĉiam, la misinformitaj personoj forigu el siaj mensoj tiun aĉan vorton MALPACO kaj ĝin anstataŭu per KUNFRATIĜO — solidara sento ekzistanta inter ni, kaj firma bazo por daŭrigo de honesta, konscia kaj fruktdona kunlaborado por Esperanto.

P E R S O N E

- La revuo Esperanto (UEA—eldono, februaro 1982) aperigas foton pri nia Prezidanto, en la fama kolumno "Persone", kaj informas: "S-ro Carlos Augusto Siqueira da Cunha, kiu estis kasisto de la 66a UK en Brazilio kaj unu el la plej aktivaj LKKanoj, havas nun gravan funkcion en la brazila E-movado. En sia kongreso, komence de novembro en San-Paŭlo, Brazila Konsilantaro de Esperanto — tiu tria E-organizaĵo en Brazilo — elektis s-ron Cunha la nova prezidanto. La ĝisnuna prezidanto, s-ro F. Souza Almada, fariĝis honora prezidanto de la Konsilantaro."

UEA—JARKOTIZOJ 1982

Ekde januaro validas jenaj kotizoj (v.revuon Esperanto, februaro/82, paĝo 39).

MJ — Cr\$ 1.040,00

MA — Cr\$ 2.600,00

La nunajn kotizojn prefere oni pagu rekte al unu el la du naciaj UEA—perantoj en Rio de Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto, Praça da República 54 — 20, BR 20211, kaj Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Av. Treze de Maio 47, sobreloja 208, BR 20031.

Rimarko — La novaj tarifoj ŝajnas al ni tro altaj por brazilanoj. Ĝuste pro tio, BKE ekzamenos la aferon, kun la celo prezentil al UEA sugeston pri malaltigo.

BRAZILIA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto

Francisco de Souza Almada, Rua Galeão Carvalhal 31, Ap. 73, BR 11100 Santos-SP

Estraro

Prezidanto: Carlos A.S. da Cunha, Caixa Postal 13-2088, BR 70000 - Brasília-DF

Vicprezidanto: Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília-DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj 08, Casa 15 BR 715000 - Brasília-DF

Sekretario: F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A-101, BR 70000 - Brasília-DF

Kulturaj Aferoj Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

Informa Bulteno

Oficiala organo de Brazilia Konsilantaro de Esperanto

Aperas monate

Dissendo senpaga

Redaktoroj provizoraj: Carlos A. S. Cunha kaj Nelson P. de Souza
Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

PROGRAMO POR LA JUBILEO DE ESPERANTO

● La Programo por la jubileo de Esperanto, ankaŭ konata per "Plano por la periodo 1983/1987", akceptita de la Komitato de UEA dum la 66-a UK em Brazilio, estis reviziita en Bad Saarow, en novembro 1981. La nuna programo kovras la periodon 1982 ĝis 1987, kaj la diversaj agadoj atingu sian kulminon en 1987, la jaro de Internacia Lingvo.

● Per festado de la jubileo de Esperanto, UEA celas: 1) plifirmigi kaj plifortigi la Esperanto-komunumon; 2) vaste konsciigi la publikon pri: a) la rolo de lingvoj en la socio; b) lingvaj problemoj, precipe internaciaj; c) la historio, nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto; 3) igi la ĉefajn internaciajn organizojn kaj registarojn de la mondo konkrete agnoski Esperanton. Tiu agnosko povus havi plej variajn formojn: de simplaj deklaracioj aŭ rezolucioj ĝis praktika utiligo de la internacia lingvo; vaste pligrandigi la nombron de simpatiantoj al Esperanto, kiuj havu vojon por identigi sin kun Esperanto kaj kun la lukto kontraŭ lingvaj problemoj kaj por la lingva egaleco.

● La agado por la jubileo streĉas ĉiujn fortojn de la E-movado. Estas grave, ke tiu impulso ne perdiĝu. UEA, la landaj asocioj kaj aliaj kunlaborantaj organizoj sekve serĉu vojojn por konstantigi la organizajn strukturojn starigitajn por la jubileo. Ili, ekzemple, celu starigi profesiajn oficejojn, eventuale en kunlaborado kun aliaj organizoj aŭ per diverspecaj komercaj kaj kulturaj agadoj.

● En la kadro de enlandaj agadoj, kiam la brazilanoj fakte komencos labori? BKE serioze interesiĝas pri tiu afero, kaj ek de nun pretas kunlabori aŭ ricevi sugestojn ĉi-rilate.

*Senlaboreco estas patrino
de ĉiuj malvirtojn.*



TRA LA MONDO

UEA EN NOVJORKO — Pro la lastatempa tre sukcesa donackampanjo, la oficejo en Novjorko sukcesos eviti la deficiton. Por plifortigi la Laborgrupon tie, estis antaŭvidataj reelekto de la samaj membroj kaj ebleco venigi helpvoluntulon.

PORTUGALUJO — Granda entuzismo ekfloras ĉe esperantistaj rondoj, en la tuta lando, pro la eldono, en Esperanto, de unu el la ĉefverkoj de la monda literaturo — La Luzidoj —, majstra tradukaĵo de Leopoldo H. Knoedt, jam konata pro elstaraj laboroj en la literatura kampo. Pro la internacia sukceso de la verko, ni gratulu ne nur la tradukinton, sed ankaŭ la brazilan Eldonejon Fonto, el Chapecó (SC), kiu je plena vaporo laboras por Esperanto, sub kompetenta kaj sindediĉa gvidado de nia samideano, s-ro Gersi Alfredo Bajs (Caixa Postal 49, BR-89800, Chapecó-SC).

INTERNACIA JARO DE KOMUNIKADO — En novembro 1981, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1983 Internacia Jaro de Komunikado. UEA lanĉos sian propran programon de agado okaze de tiu jaro, kiu konsistigos formalan komencan periodon por la kvinjara festado de la Jubileo de Esperanto.



**representações
brandt Ltda.**

Empreendimentos Imobiliários
Compra — Venda — Administração

226-8988 — 223-7311

SDN Cj Nac Brasília s/6106 — 3ª Etapa
Brasília - DF

MADRIDA ESPERANTO-LICEO — (Atocha, 98, 4º — Madrid 12 — Hispanujo) informas pri Seminario pri Sporto okazonta en tiu urbo en la periodo 07/11—julio 1982 kiun patronas la hispana Ministro pri Transporto, Komunikado kaj Turismo. Tiu evento estas tre oportuna, ĉar tie okazos samtempe la ĉi-jara Monda Futbala Ĉampioneco.

BULGARIO — La Bulgara Esperantisto (Bul. Ĥristo Botev 97 — 1303 Sofio), raportas en tri paĝoj pri la 66-a UK en Brazilio kun la plej afablaj vortoj, ekzemple: "La naturo kaj la klimato de Brazilo estas belegaj, sed la plej granda trezoro de tiu fora lando estas ĝia simpatia, laborema kaj gastama popolo." La revuo estas plena de tre gravaj informoj pri la atingoj de E. en tiu lando, nome: 1) Unua Esperantologia Simpozio okazinta la 26an/27an de septembro ĉe la Sofia Universitato "Ĥliment Ĥridski"; 2) Internaciaj E-aranĝoj en Žilina inter la 14a kaj 22a-aŭgusto, kies temo estis "Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko, en ĉiutaga vivo kaj turismo"; 3) Unua Nacia Metodika E-Konferenco, en Sofio, por pridiskuti la agadon por la decido de la Ministerio de Popola Klerigado pri fakultativa lernado de Esperanto en la 9-a klaso de gimnazianoj kaj de la I-a kurso de mezaj faklernejoj.

INTERLIGILO — Organo de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio (Poŝtenska Kutija 25 — 1000 Sofia-C — Bulgario), raportas pri la 13-a ĉefkunveno okazinta dum la 66a UK: "Kvankam ne amase vizitita, la ĉefkunveno de IPTEA en Brazilio estas esprimo de deziro fare de la esperantistoj en la sfero de la Poŝtoj kaj Telekomunikoj utiligi la Internacian Lingvon Esperanto en sia praktika agado." (Rimarko — Kiu estas la brazilia reprezentanto de IPTEA? aŭ kiu pretas preni la reprezentadon?)

UK 1983 — UEA ricevis skriban inviton de Ungara Esperanto-Asocio por okazigi la 68-an UK en Budapeŝto. Kelkajn formalajojn C.O. atendas por akcepti la inviton. Sed vi povas skribi sur via notkajero, ke la evento sendube efektiviĝos en Budapeŝto, laŭ opinias niaj redaktoroj.

POLLANDO — Surbaze de propono farita de Pola Esperanto-Asocio, la direktoraro de UEA akceptis kunlaboran kontrakton pri establo de Turisma Servo en Varsovio, finance sendependa de la akceptinto.

*Estas pli facile faligi . . . la Berlinan
Muron, ol forigi antaŭjuĝeton
el menso de unusola homo
(Walter A. Francini).*

BRAZILAJ NOVAĴOJ

FEDERACIA DISTRIKTO:

● Laborgrupo "Antaŭen" (Brasília) — Kun ĉirkaŭ 100 membroj el la tuta lando fondiĝis la nova grupo por eldonado, ĉefe de "Brazilaj Kajeroj", kies unua numero estas "Brazilaj Geografiaj Nomoj" aperinta dum la 66a UK (Poŝtkesto 07-1055 — CEP 70000).

● Brazila Konsilantaro de Esperanto (Brasília) Lastatempe membriĝis al BKE jenaj personoj: Mauro Gomes Azevedo, Francisca Martos, José Martins Coelho, Antonio Rodrigues da Silva, Fernando José Galvão Bueno, Luiz Antonio P. Menechino, Délio Pereira de Souza, Erlindo Salzano, José Paulino Alves Júnior, Armindo Trarbach, Joaquim de Carvalho, Modesto Belmonte de Abreu, Neima Cardoso Adorno, Marcello Vieira de Andrade, Gilberto Aquino Silva Velho, Francisco Rodrigues de Moraes Sobrinho, José Carlos Dorini Ramos, Mozar Alves de Andrade, Antonio Bezerra de Oliveira, Fanny Dupré, Néia Lúcia Souza, Manoel Torres de Abreu, Cláudio Zimmermann, Pedro Jacintho Cavalheiro, Lauro Jorge de Oliveira, Seraphim Guedes, Maurício Foschi, Nelson Bernardo, Eneide Armanda Santis Bastos, Elvira Fontes, Ruth Alves Medeiros, Espedita de Castro Feitosa, Agostinho Rodrigues, Jairo Pereira Rezende, Dilermando Teixeira, José Dias Pinto, Nestor Lellis, Elias Couto de Almeida, Alberto Flores, Amaro Pinagé Soares, Wanderley Peres, José Passini, Jonas Felix de Oliveira, Jorge Agnelo da Cruz, Nydia Aydos Krieger, Maximiliano de Oliveira e Silva, Antonieta Almada Miranda, Ademir Nascimento Alves, Allan Kardec Afonso Costa e Waldir Lisboa Rocha.

● En la Fakultato CEUB pasintjare diplomiĝis 30 gelnantoj sub gvidado de nia vicprezidanto Nelson P. Souza, kiu ankaŭ respondecis pri pagita kurso de Esperanto okazigita en la Lernejo Compacto, kun ĉeesto de gravaj perso-

noj. Ĉi-lastaj kurso finiĝis la 9-an de decembro 1981, per diplomiĝo de 17 gesinjoroj. Estas menciinde, ke aliaj kursoj disvolviĝas en satelitaj urboj, sub protekto de Taguatinga Esperanto-Rondo, Spiritisma Centro Allan Kardec kaj Spiritisma Centro de Sobradinho, sub gvidado de s-ro Ludimar Azevedo Silva, D-ro Arcelino A. Silveira kaj D-ro Aymoré Vaz Pinto, respektive. Al ĉiuj asocioj kaj instruistoj nian varman aplaŭdon!

RIO DE JANEIRO

● Societo "Lorenz" (Rio) — Funkcias en nova sidejo pruntedonita de Lar Fabiano de Cristo kaj SEI — Spiritista Esperanto-Informilo (Rua dos Inválidos 34, s/901, BR 20.231). En la nova ĉambro la estraro festis la 15-an de decembro kaj inaŭguris portreton de Zemenhof.

● A.E.R.J. (Rio) — En decembro okazis kursfino ĉe la provizora sidejo (Aliança da Fraternidade, rua Paula Brito 715, BR 20541). La prezidanto, Generalo D-ro Chersoneso Galvão, kaj la tuta estraro aktivas por havigi propran sidejon. Ĉu vi povas monhelpi?

● Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Av. 13 de Maio 47, sobreloja 208, BR 20031 — Rio), ĉi-jare okazigos la tradician Seminarion de Esperanto en la urbo Uberlândia (MG), de la 23-a ĝis la 26-a de julio 1982.

● Karavano al la 67-a UK — S-ro G. PETIOT (Caixa Postal 96920, BR 28600, Nova Friburgo) pristudas la organizon de karavano al Antverpeno kaj aliaj landoj. La interesatoj skribu tuj al li.

● VII Brazila Kongreso de Ĵurnalistoj kaj Verkistoj Spiritistoj (Rua Senador Dantas 117, sala 1001, BR 20.031 —

Rio) — Ĉi-jare la kongreso okazos en la urbo Salvador (BA), de la 17-a ĝis la 21-a de aprilo 1982. Konsiderante la grandegan nombrom da esperantistoj-spiritistoj en Brazilo, oni atendas amasan partoprenon de samideanoj por pliintensigi la disvastigon de Esperanto en la medio.

● Por-E.Mormonaro — Samideano Alfred Karl Gregorius (Rua Visc. Pirajá, 411, ap. 301, BR 22410 — Rio) faras bonegan laboron por la uzado de Esperanto inter la mormonaro kaj tradukas interalie la verketon "La Atesto de Jozefo Smith."

SÃO PAULO

● Eldonejo "Klara Zilbernick" (Rua Faustolo 124, BR 05041 — São Paulo) — Tiu eldonejo estas kreita de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, en kunsido okazinta la 24-an de januaro 1982. Ĉiu esperantisto povas kontribui per kotizo de Cr\$ 5.000,00. Tion jam faris BKE kaj ĝia Prezidanto.

● Sorokaba Esperanto-Asocio (Rua da Penha 455, BR 18.100 — Sorocaba) — En la sidejo okazis jarkunveno kun ĉ. 200 personoj, kiam oni elektis novan Estraron, kies prezidanto estas

D-ro Eluízio Bueno Rodrigues. Tiukaze oni aljuĝis la premiojn de la konkurso organizita de tiu Klubo, kiun partoprenis gejunuloj el la tuta Lando. Estis 10 gajnintoj el kiuj la dua vico estas Maria Miranda, de Brazilio.

● Bauru Esperanto-Asocio (Poŝtkesto 63, BR 17100 — Bauru) — Gravegan laboron antaŭlonge faras la Prezidanto, Profesoro Euclides Geraldís de Carvalho, kun la celo finenkonduki Esperanton en la lernejojn. Lia lasta esploralaboro (Enketo en unua k dua gradaj lernejoj en Bauru) montris, ke el la 177 gelnantoj partoprenintaj la enketon, 76,42% estas favoraj al instruado de Esperanto en tiaj lernejoj.

MINAS GERAIS

● Instituto Esperanto (Rua Guajajaras 410, s/809, BR 30000 — Belo Horizonte) anoncas gravajn planojn por 1982, kiu inkluzivas la publikigon de "cirkulero monate ... kaj akurate."

PARANÁ

● La Instituto Neo-Pitagórico (Caixa Postal 1047, BR 80000 — Curitiba), eldonis flugfolion kun ĉefverko de Pitagoro — La Oraj Versoj, kiun oni disdonas senpage.

ALVORADA HOTEL



No Coração de Brasília - DF

O melhor atendimento durante o 66º Congresso Mundial de Esperanto
Aptos. espaçosos, com banho quente
TV a cores, frigobar, telefone, música ambiente e farto café matinal

★★★ Categoria 3 Estrelas

10% de desconto para esperantistas

Setor Hoteleiro Sul — 4 Bl 4

Fone (061) 225-3050

Brasília - DF

GUTOJ GRAMATIKAJ ●●●

El la bonega gramatiko por progresintoj, verkita de Henrik Seppik (La Tuta Esperanto), ni prenis la jenon:

AL kaj EN

Anst. "en la lernejoN", "en la fabrikoN", "en la urboN" oni povas ofte diri "al la lernejo", "al la fabriko", "al la urbo", kvankam teorie tiuj formoj ne estas samsencaj.

"Al la lernejo" esprimas nur movon en la direkto de la lernejo kaj ne montras, ke oni atingas kaj eniras ĝin, dum "en la lernejoN" indikas, ke oni haltas nur interne de la lernejo. Sed en la praktiko tiu

diferenco ludas ofte nenian rolon, ĉar la lingvo ne estas ja matematiko kaj kutime oni ne bezonas esprimi sin kun matematika precizeco.


ĜIS

La diferenco inter "al" kaj "ĝis" estas tio, ke "al" indikas nur direkton, dum "ĝis" fiksas ankaŭ la limon: "Li iris ĝis la pordo" (la pordo estis la limo, ĝis kiu li

iris). "De tiu turo oni povas vidi ĝis la najbara urbo. "La kurso daŭros ĝis kristnasko". "Ĝis tiu tempo ni lernos la tutan Esperantan gramatikon". "La lecionoj estas de la sepa ĝis la naŭa". "Ĝis revido"!

"Ĝis" estas uzata ankaŭ konjunkcie, t.e. sen substantivo: "Hieraŭ mi legis ĝis (aŭ ĝis kiam) mi endormiĝis".

"Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos, ĝis (aŭ ĝis kiam) la bela sonĝo de l'homaro por eterna ben'efektiviĝos".



EL LA GAZETARO

● SEI – Ĉiusemajna Bulteno de "Serviço Espírita de Informações" (Rua dos Inválidos, 34, BR 20.231 – Rio de Janeiro (RJ), en ĉiu numero aperigas informojn plej aktualajn pri E-movado.

● KOMUNIKOJ – Oficiala organo de Societo Lorenz (Poŝtkesto 3133, BR 20001–Rio de Janeiro-RJ), diskonigas jenajn informojn: 1) dissendo de la libro "De Francisko el Asizo por vi", al la membroj en la tuta mondo; 2) la libro "Ha! Se Mi Scius..." estas disdonata senpage al ĉiuj interesatoj; 3) ĵus aperis "Almanako Lorenz – 1982".

● A GAZETA ESPORTIVA – Ĉiudimanĉe publikigas rubrikon "Esperantismo", kiun redaktas gesamideanoj de São Paulo (Av. Paulista 900, BR 01000 – São Paulo-SP).

● COMARCA DE PROMISSÃO (Av. Minas Gerais 530, BR 16370–Promissão–SP), en longa artikolo informas, ke la loka E–Asocio kaj la Rotaria Klubo okazigas E–kurson en komunuma ĉambro, kun 50 gelnantoj.

● O SOL NASCENTE (Rua Boiobi, 2102, BR 21820 – Rio de Janeiro-RJ), aperigas rubrikon "Esperanto em Marcha" gvidatan de s-ano Givanildo Ramos Costa, kiu multe helpis al LKK de la 66-a Universala Kongreso.

● MUNDO ESPÍRITA (Alam. Cabral, 312, BR 80000–Curitiba–PR), publikigas novaĵojn pri nia Movado, laŭ redaktado de s-ano Gilberto Silva Velho.

● DIÁRIO DE TAUBATÉ – La senlaca laboro de s-ano Silva Velho montriĝas ankaŭ pere de la rubriko "O Esperanto Informa" en tiu gazeto.

● REFORMADOR (Av. Passos 30, BR 20051–Rio de Janeiro-RJ) – Monata organo de Brazila Spiritisma Federacio, en ĉiu numero publikigas diversajn pri Esperanto: artikolojn, poeziaĵojn k.a. krom la konstantan liston de spiritismaj libroj en Esperanto.

● FOLHA ESPÍRITA (Rua Alvares Machado, 22 - 49 BR 01501 - São Paulo-SP) - Spiritisma ĵurnalo vendata al publiko, en ĉiu numero aperigas artikolon verkitan de D-ro Walter Augusto Francini, direktoro pri kulturaj aferoj de BKE.

● TAPERÁ (Caixa Postal 80, BR 13320 Salto-SP) – Informas pri okazigo de kurso kaj kunveno por fondi la lokan klubon. Tiun laboron faras s-anoj Agostinho Rodrigues kaj Profesoro Lannoy Dorin, helpataj de la prezidanto de Sorokaba E-Klubo, D-ro Elufzio Bueno Rodrigues.

**NEIMA CARDOSO ADÓRNO PAROLAS PRI LA IVa BRAZILA
JUNULARA ESPERANTO – KONGRESO (28 ĜIS 31/01/82),
OKAZINTA EN NATAL (RN)**

BKE sukcesis intervui la prezidanton de BEJO (Brazila Sekcio), kiam ŝi, ĵus reveninte el Natal, atendadis la liveradon de siajn kofrojn kaj pakaĵojn, en la flughaveno de Brazilio. Post kelkaj salutvortoj, nia raportistino Berenice K. Eliot demandis:

BKE – Kiel vi vidis la IVan BEJO–KONGRESON sub ĝiaj ĝeneralaj aspektoj?

NCA – La kongreso en Natal estis konkreta paŝo por enkonduki novan pli seriozan agadmanieron, pensmanieron en la junulara movado kaj samtempe plibonigi la E-nivelon de niaj gejunuloj.

BKE – kiom da personoj aliĝis kaj efektive partoprenis la eventon?

NCA – Aliĝis al la kongreso 146 personoj, sed ĝin partoprenis 75 geesperantis-toj, el kiuj 10 plenkreskuloj.

BKE – Ĉu la registaro kaj popolo el Natal apogis la manifestacion?

NCA – Jes. La registaro firme subtenis la kongreson. La urbestro oferis bankedon al la gekongresanoj, Banko de Rio

Grande do Norte donacis 30.000 kruzejrojn por la organizado; aŭtoritatoj, ekzemple la vicrektoro de la fakultato, la respondeculo pri la ŝtata civila kabineto kaj aliaj gravaj personoj honorigis nin per fizika ĉeesto en la solena inaŭguro.

BKE – Kian rezolucion aŭ mesaĝon la kongresintoj aprobis?

NCA – Ili aprobis jenan mesaĝon: “Baza paŝo por nia integriĝo estas la neprokrastebla plibonigo de nia E-nivelo kaj pli aktiva partopreno en la movado ĝenerala.”

BKE – Ĉu vi volas aldoni iom pli, rilate la eventon aŭ pri iu ajn temo ligita al E-movado?

NCA – Denove ni konstatas, ke en nia movado – estu ĝi junulara aŭ ĝenerala – mankas pli da persona aktivado, pozitivaj kritikoj kaj konkretaj laboroj. Nu, kara raportistino, lasu en tiu ĉi momento, ke mi gratulu kaj danku BKE–Bultenon pro la iniciativo permesi al mi paroli al la tuta lando je la nomo de nia junularo. Tre koran dankon!



ĈU VI KAPABLAS RIDI?

La Diferenco

- Ĉu vi scias la diferencon inter vagonaro kaj lana kovrilo?
- Ne, tute ne!
- Nu, vi prove kuŝu sub ili!

Pri Alkoholo

Paralanto: “La alkoholo pereigos nian popolon. La statistiko pruvas, ke 50% el ĉiuj krimfaroj okazas sub la influo de ebrigaĵaj trinkaĵoj.”

Voĉo el la publiko: “Kaj se vi malpermesos la alkoholon, tiam 100% el la krimoj estos la sekvo de l’ abstinenco.”

oOo

Inter Virinoj

– Hieraŭ ĉe la ĝardeno festo mi vidis Karlson, sed li ne vidis min.

– Jes, tion li rakontis al mi.

oOo

(Anekdotoj prenitaj el la libro “Miru, Pensu, Ridu!”, verkita de Paul Benne-mann, Eld. Heroldo de Esperanto, 1950)

MALFERMATAJ LETEROJ

Brazilio (FD), 31/01/82

Kara Leganto.

Nenion vi ŝuldas aŭ devas pagi por ricevi en via hejmo, ĉiumonate, tiun ĉi Informan Bultenon. La motivo estas simpla: nia revuo ne estas vendebla!

Tamen, se ĝi plaĉas al vi, kaj propravole vi deziras kontribui por la pago de ĝia eldonkosto, elektu unu el la tri vojoj,

a) fariĝu individua membro de BKE, kies jarkotizo por 1982 estas Cr\$ 1.200,00;

b) sendu mondonacon je kiu ajn valoro;

c) uzu samtempe la du eblecojn (a + b), sed ne koleru, se viaj familianoj konsideros vin malsparema persono.

Ni antaŭdankas vin, pro la sendota kontribuajo, kaj prezentas elkorajn salutojn.

a) C.A. Cunha - BKE-prezidanto

Bona Espero (GO), 21/12/81

Estimata Redakcio,

Malheplpita partopreni la 2-an Kongreson de BKE, mi legis kun intereso la raporton de la prezidanto. Pri kio koncernas mian personon, mi petas vin informi la legantojn de via bulteno, ke nenian meriton (aŭ kulpon), mi havis en la organizado de la 1-a Latin-Amerika Esperanto-Kongreso en Marília kaj de la 66-a Universala Kongreso en Brasília. La unua manifestacio estis organizita de la esperantistoj en Marília kun apogo de pluraj landaj organizaĵoj kaj la Universala Kongreso okazis ekskluzive sub la respondeco de la Esperanto-Asocio en Brasília, kun la morala apogo de la tuta brazila Esperanto-movado.

Kun plej koraj salutoj,

a) Giuseppe Grattapaglia



Nelson k Cunha venas al grava konkludo: nur la legantaro, per mondonacoj k aliĝkotizoj, povas nuligi la konstantan deficiton de nia Bulteno